

Traduka laborfolio por la
 21a de februaro 2020, tago de la gepatra (patrina) lingvo
 [Pretaj lingvoversioj: albana, angla, astura, esperanta, itala, rusa, slovaka
 Ricevitaj, en laboro: serba (cpncku), bulgara.
 Lasta aktualigo de ĉi tiu tradukfolio (ricevitaj lingvoversioj, ktp): 2020 januaro 07,
[20h22/CHJ](http://www.linguistic-rights.org/21-02-2020/)]

Afiŝo

La bonaj, ĝustaj ekzemploj estas tie:
<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2020/>

Atentu!

En la antaŭjaraj afiŝoj [2016](#) - [2017](#) - [2018](#) - [2019](#)
 la tekstoj ne estis ekzakte la samaj!

Bonvolu uzi por via traduko la ĉi subajn tekstojn,
 enskribante vian tradukon en la linion ('via lingvo') sub la esperanta teksto.

Sekve, bv. sendi viajn dokumentojn en Word+PDF-versioj al
 traduko (ĉe) [linguistic-rights.org](http://www.linguistic-rights.org) + peteroliver (ĉe) wanadoo.fr + [renato.corsetti \(ĉe\) gmail.com](mailto:renato.corsetti@gmail.com)

	<i>Tekstoj de la afiŝo por traduki vialingven, via lingvo estas la:</i>	<i>Rimarkoj</i>
1 esperanto	Internacia Tago de la Gepatra Lingvo	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo. <i>Grave : provu arangi vialingvan version lau tiuj 4 unu- sub-la-alia linietoj, kiel ili estos sur la afiŝo. En la japana, korea, taja, ĉina kaj similalfabetaj/skribajhaj lingvoj, kie oni skribas ech en unu sola 'vortego' la tutan frazon, sen disigi la vortojn, ni ne scios, kie disigi la vortojn Tago, Gepatra(au patrina) kaj Lingvo...!</i>
1 en via lingvo:		
2 esperanto	21a de februaro 2020	
2 en via lingvo:		

3 esperanto	En oficialaj rilatoj kun UN kaj UNESCO	la teksto kiu estas sub la UEA-sombolo dekstre supre
3 en via lingvo:		
4 esperanto	« Ni devas defendi ... la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias, ke ili malaperas nuntempe laŭ la ritmo de po unu ĉiujn du semajnojn - kio estas neriparebla perdo por la homa heredaĵo. » Ĝenerala Direktoro, UNESCO	eltiraĵo el la Unesko-mesaĝo
4 en via lingvo:		
5 esperanto	Infanoj rajtas lerni per sia hejma lingvo. Unesko kaj la movado por la internacia lingvo, Esperanto , respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturen diversecon en la mondo.	← bonvolu ruĝigi la vortojn UNESKO kaj Esperanto - ankaŭ en via traduko
5 en via lingvo:		
6 esperanto	Legu pli:	(Tio estos antaŭ la retligo: www.linguistic-rights.org/21-02-2020 - kion ni aldonis super la du ĉi-subajn)
6 en via lingvo:		
7 esperanto	Pri lingvoj:	tio estos apud la ligo: www.lingvo.info
7 en via lingvo:		
8 esperanto	Pri interreta komunikado:	Vi povas elekti la vorton 'interpopola' aŭ 'inter la popoloj', (anstataŭ 'interreta'), se tio estas pli kutima en via lingvo.

		Tio estos malsupre, apud la ligoj: esperanto.net kaj uea.org
8 en via lingvo:		

Viaj sugestoj, nia peto - por via teknika helpo:

a) vi uzas la vialingvan litertipon (,font‘): (por ke nia grafikisto, Peter Oliver povu ĝin elŝuti kaj uzi dum kreado de vialingva aŝiŝo. (ekz. tiu ĉi laborfolio estas skribita per la litertipo (font) au karaktero: «Times New Roman») - kelkfoje tio tre utilas kaze de alialfabetaj/litertipaj lingvoj.

b) via cetera sugesto, rimarko:

c) Nia peto: bonvolu - post plenigo vialingva de tiu ĉi tabelo kaj rimarkoj - registri la dokumenton Word-an ankaŭ en PDF-versio, por povi kompari kaj rimarki eventualan modifiĝon de vialingva teksto en nia komputilo/programo. Do, resendu al ni tiun ĉi Word-an version de via tradukrezulto, kaj aldonu ankaŭ ĝian PDF-version.

GRANDAN DANKON por via valora kunlaboro!

Stefano Keller kun Peter Oliver kaj Renato Corsetti, ĉefkunordigantoj de la agado.

Bv. sendi vian tradukaĵon (en Word + PDF) adresante al jenaj 3 personoj:

Peter Oliver, la grafika specialisto: **oliverpeter626 (ĉe) gmail.com**

Stefano Keller, tekstoj, reta publikado: **traduko (ĉe) linguistic-rights.org**

Renato Corsetti, ĉefkunordiganto: **renato.corsetti (ĉe) gmail.com**